# Mi stelojn jungis al revado – recenzo

## FRANCISKA TOUBALE (MELBURNO)

Dum la maratona kurso de julio 2023 la klaso gvidata de Duncan Charters okazis en la biblioteko de la kastelo Greziljono. Por stimuli la legemon de la ĉeestantoj, Duncan petis, ke ĉiu elektu libron kaj prezentu ĝin al la grupo. Mi opiniis ke romano de Anna Löwenstein tute taŭgas ĉar krom historia intereso, ĝi povus esti la deirpunkto de ofta kaj grava debato pri la uzo de fundamentaj vortoj kontraŭ la uzo de neologismoj. Tamen retenis mian atenton la ruĝa kovrilo de la verko de Mikaelo Bronŝtejn, *Mi stelojn jungis al revado*. Kiam ĝi estis publikigita, mi legis recenzojn kaj finfine venis la oportuno ĝin akiri.

Tiu verko estas miksaĵo de aŭtentaj dokumentoj, reproduktitaj en la lingvo en kiu ili aperis, ĉu la rusa, la angla aŭ Esperanto, kaj historio de la Esperanto-movado en Sovetunio en la komenco de la 20a jarcento, prezentita en romana formo, kun imagitaj roluloj, tamen bazitaj sur realaj esperantistoj. La leganto povas sekvi la pligrandiĝantan famon de Esperanto ĝis la persekutado de la Esperanto-parolantoj kaj la portempa malapero de la movado. Kune kun la libro de Ulrich Lins, *La danĝera lingvo*, kaj la traduko de Kreŝimir Barkoviĉ, *7000 tagoj en Siberio*, ĝi helpas bildigi la etoson de tiu epoko, la entuziasmon sekvitan de elreviĝo kaj teroro.

Plie ĝi povas helpi ankaŭ kompreni la kompleksecon de la hodiaŭa milito en Ukrainujo pro la tiama deziro de la regantoj krei la sovetan homon, novan homon kies etnaj trajtoj estus nuligitaj. Estante SATano, mi pli bone komprenas kio apartigis la du famulojn Drezen kaj Lanti. Mi dubas, ke amo por la sama virino estis la ĉefa kialo, kvankam tio estas bone elpensita spicaĵo en la romano. Mi ĝojas, ke Lanti rifuzis strukturi la asocion laŭ unika pensmaniero, piramida strukturo, kion defendis Drezen, volonte sin submetante al la sovetaj regantoj. Male Eŭgene Adam malfermis ĝin al diversaj pensmanieroj: komunista, anarkiista, sennaciista, pacifista aŭ ekologia, pere de la frakcioj, tiel ke anstataŭ same pensi, la SATanoj prefere komparas siajn ideojn kaj pliprofundigas la kialojn pro kiuj ili atingis la elektitan konkludon.

Se Drezen venkus, SAT certe estus komunista asocio kiel kelkaj – nun maljunuloj – kredis kaj probable mal-aperus same kiel li. Dank' al la saĝeco de Lanti, ĝi daŭre sekvas sian vojon kun siaj sukcesoj kaj siaj malfacilaĵoj.

La stilo de Mikaelo Bronŝtejn estas plaĉa pro ĝia simpleco, precizeco kaj humuro. E

